



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 16-a de Februaro 2021

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Gastoj: (partatempe) Jinon Meiri, Judith Epstein.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

a) **Amri:** Aperis lia artikolo en la bulteno de PAKESA (Pakistano). Sur la kovrilo estis kaŝita la fonto, tamen menciita interne.

b) Ĉu la prezoj de la oficejoj devus malaltiĝi post la koronviroj jaro? Amri daŭre provadas trovi taŭgan lokon.

2. Buĝeto 2020 (Ŝlomo)

Sur la ekrano estis prezentita la planita buĝeto 2020 kontraŭ ties plenumo. La estraranoj demandis kaj diskutis pri la diversaj punktoj.

3. Dratverejo

a) La patrino de Marina – Ludmila – ekloĝis. Ŝi pagis la monatajn 3,100 siklojn, sed ankoraŭ ne pagis por likvidi la ŝuldon, kiel ŝi promesis – 2,000 pliajn siklojn, pro diversaj restaĵoj de ŝia antaŭa luita loĝejo. Eble en Marto ŝi jam pagos ankaŭ tion.

b) La riparado de la banĉambro estos supozeble morgaŭ. Aliaj damaĝoj estos riparitaj ekster la loĝejo – per la asekur-kompanio.

c) Ni devos renovigi la asekuron por la loĝejo – tio pravigis sin.

4. Niaj membroj en UEA (Amri, Jehoŝua)

Amri: kion ni povus fari por pligrandigi la nombron de niaj membro-pagantoj al UEA?

Jehoŝua: Ĉi-jare niaj kotizoj estis oficiale reduktitaj al Kategorio 4 (anstataŭ 5), do la MB (Membreco Baza) kostas nun 27 EUR – ~ 108 NIS (anstataŭ 44 EUR). Ĉu ni kombinu la membrecon de ELI kaj de UEA per ia rabato el nia kaso? **Aprobata decido:** kombinita pago por ambaŭ estos 180 sikloj (anstataŭ 108+100) – do, 28-sikla rabato. Ĝin ricevos ankaŭ tiuj, kiuj havas alian rabaton pri ELI-membreco (familiar, kvinjaran, ktp).

La venonta kunsido: la 9-an de Marto, 2021, je la 20h00 (zom-kunveno)

Protokolis: Gabi Zeevi